

KROATA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KROATA ESPERANTISTA UNUIĜO

DUMONATA

GAZETO

Prezo de ĉi tiu
numero estas
250HRD aŭ 2 guldenoj

Jarabono
600 HRD aŭ
12 guldenoj



Redakcio:
Trg burze 2
ZAGREB



BIBLIOTEKO DE S-ro FAJSZI

"KROATA ESPERANTISTO"

izdavaĉ i osnivaĉ

eldonisto kaj fondinto

HRVATSKI ESPERANTSKI SAVEZ
KROATA ESPERANTISTA UNUIĜO
ZAGREB, TRG BURZE 2

urednik / redaktoro
Marija BELOŠEVIĆ

jeziĉno pregledala
lingve kontrolis:
Lucija Borĉić

izlazi dvomjeseĉno
aperas ĉiun duan monaton

Za sadrĵaj ĉlanaka odgovaraju sami autori.
Pri ĉiuj artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Tisak / Presejo

"More", Preradoviĉeva 7/I, Zagreb

tiskano / presita
1992.11.28.

cijena ovog broja / prezo de ĉi tiu numero
250HRD aŭ 2 guldenoj (eksterlando)

godiŝnja pretplata / jarabono
600 HRD aŭ 12 guldenoj (eksterlando)

Eksterlandanij pagu al UEA konto KREU-g

Ĉlanovi Maloga vijeća HES / Estraro de KEU

- Radenko Miloŝević, predsjudnik/ prezidanto

- Marija Beloŝević, tajnik / sekretario

- Ivan Bekavac - Basić, potpredsjednik / vicprezidanto

- Sandra Gabrilo, potpredsjednik / vicprezidanto

- Zdenka Svetličić, potpredsjednik / vicprezidanto

- Franjo Šlabek, potpredsjednik / vicprezidanto

Miŝljenjem Ministarstva prosvjete, kulture i ŝporta Republike
Hrvatske br. 523-03-1/7-92. godiĉne, novine Hrvatskog esperantskog
saveza "Kroata Esperantisto" oslobodene su poreza na promet proiz-
vodima.

Estimataj,

ĉe la komenco ni eluzas la eblecon kaj dankas al ĉiuj kiuj decidis kaj
jam sendis la abonon. Vere tio multe helpas kaj helpas al ni! Same ni
esprimas dankon al ĉiuj subtenantoj, moralaj. Kiel promesite en la
lasta numero, Vi trovos kelkajn reagojn. En la venonta numero ni
atendas la Vian!

Ha, jes, ni eluzas la eblecon kaj atentigas Vin iomete pri la agado
de Kroata Esperantista Unuiĝo. Feliĉe, finfine aperis nia unua libro,
kiu jam estas diskonigita internacivele. El la gazeto videblas nia
eksterzagreba agado, ni esperas en la estonteco pli intense agi en la
tuta Kroatio.

En ĉi-numero Vi ne trovos intervjuon, sed...

Ni ne adiaŭas Vin kun ĉi-numero en la jaro 1992. Antaŭ
Kristnasko Vin atingos duobla numero kiu laŭ nia deziro estos vere
belega donaco al Vi.

Tamen, ni eluas la eblecon jam ĉi foje deziri al Vi ĉion bonan
okaze de la kristnaskaj kaj novjaraj festotagoj!

Marija Beloŝević

MALLONGIGOJ

CO	—	Centra Oficejo (de UEA)
Ij	—	Internacia ĵurnalisto
IKUE	—	Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista
ILEI	—	Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj
IM	—	Individuala membro
IRK	—	Internacia respondkupono
KCE	—	Kultura Centro Esperantista
KE	—	Kroata Esperantisto
KEU	—	Kroata Esperantista Unuiĝo
LS	—	Landa Sekcio
UEA	—	Universala Esperanto-Asocio
UK	—	Universala Kongreso

ENHAVO

● MALLONGIGOJ	26	● FESTO DE BOLONJANOJ	32
● OKAZIS EN ZAGREBO	27	● EVENTOJ	33
● ZAMENHOFTAGO '92	27	● AMUZAĴOJ	33
● KONCIZE	28	● OMBRO	33
● REMEMORO PRI SARAJEVO	28	● ETULA ANGULO	34
● KROATA LITERATURO	29	● JUNULARA MONDO	34
● PEDAGOGIA PAĜO	30	● PAĜO DE LA LEGANTARO	35
● EDUKA REZOLUCIO	31	● AMUZAĴOJ	35
● EL LA VIVO DE ESPERANTISTOJ	31	● GRATULOJ	35
● OMBRO	31	● ANONCOJ	36
● 750 JAROJ DE LA ORA BULEO	32		

PREPARKUNSIDO POR LA TUTMONDA KROATA KONGRESO

Al la mondo estas bone konata la agado kaj celoj de la Juda tutmonda kongreso aŭ Pola tutmonda kongreso. Do, tiuj du povus eble esti veraj "speguloj" de la agado tiukampe. Tio ne signifas, ke ne ekzistas aliaj similaj organizaĵoj en la mondo, kiuj ligiĝas kaj helpas al sia patrolando. Sed kiam oni parolas pri Kroatio, io tia ne ekzistas. La afero povas estis komprenebla, se oni scias de kiam datas la nova memstara ŝtato.

Sed ekster la patrolando ekzistas multaj organizaĵoj, plej parte kulturaj kaj katolikaj. Ili ĝis nun, kaj speciale dum la milito helpis al sia patrolando, kaj dum jardekoj zorgis, ke la plej novaj generacioj ne forgesu sian patrinan lingvon, kulturon, k.a.

Multaj organizaĵoj komencis pli forte kunlabori ĝuste kiam komenciĝis la milito, por pli efike helpi al la patrolando. Ĝuste en tiu kunlaboro, iniciante de la Unuiĝo de kroataj kuracistoj ekster patrolando naskiĝis la ideo por organizi ion similan al la du jam menciitaj tutmondaj organizaĵoj ĉe la komenco de ĉi teksto. La kuracistoj mem, antaŭ nelonge en Germanio organizis 1-an tutmondan kongreson de kroataj kuracistoj.

Ili kelkajn monatojn kolektis adresojn, korespondis kaj finfine forsendis invitleterojn el Kolonjo, kun la deziro renkontiĝi en Zagrebo, komence de oktobro ĉ.j.

La Malnova magistrato gastigis tri tagojn kvincenton da kroatoj venintaj el la najbaraj landoj, tuta Eŭropo, sed same la foraj Usono, Sudameriko, Aŭstralio.

Post la formala prezento de la unuopaj organizaĵoj, oni laboris en pluraj laborgrupoj. Apartaj konkludoj estis akceptitaj rilate la aktivan partoprenon en la renovigo de la patrolando, helpo al patrolando kun pri



Otto Habsburg kun kroatoj

kunlaborema organizado, pli bona kunlaboro kun diversaj institucioj en Kroatio kaj helpo al kroatoj vivantaj en ne riĉaj ŝtatoj, pli intensa kunlaboro kampe de edukado kaj organizo de diversaj programoj por la junularo. Estis proponita statuto kaj la nomo. Komence de la 1993-a oni organizos en Zagrebo Tutmondan kroatan kongreson aŭ alinome nomitan organizaĵon.

Menciinda estas la tutpostagmeza renkontiĝo kun Otto Habsburg, kiu estis en privata vizito en Kroatio, kaj tre afable akceptis la inviton veni kaj diri kelkajn vortojn. La en-kaj eliro estis akompanantaj per granda aplaŭdo.

En dekminuta parolo, li menciis la problemojn kiujn li mem havis eblecon renkonti kiam oni parolis pri Kroatio eŭroponivele. Sed, nun li dividas la feliĉon kun la kroata popolo pro la memstara ŝtato.

Same li tre subtenis la ideon fondi Tutmondan kroatan kongreson, kaj donis kelkajn saĝajn konsilojn.

Post granda aplaŭdo, s-ro Habsburg restis en amika interparolo kun la ĉeestantoj.

M.Belošević

Kroata Esperantista Unuiĝo

invitas Vin al la

ZAMĤNHOFAGO'92

la 12-an de decembro 1992 je la 11-a horo

Internacia Ekzameno de UEA/ILEI

je la 16-a horo

Diservo en Esperanto

Franciskana preĝejo,

Kaptol 9, Zagreb

je la 17-a horo

Solena programo

Salono de "Tribina Grada Zagreba"

Kaptol 27, Zagreb

Prelegoj kaj ekspozicioj en aliaj kroataj urboj.

invitas Vin al la prezento de la libro

"Poemaro de Kroatoj en Hungario"
"Pjesništvo Hrvata u Mađarskoj"

la 18-an de decembro 1992. je la 13 horo

Salono de "Tribina grada Zagreba"

Kaptol 27, Zagreb

la libron prezentos:

dr. Mijo KARAGIĆ

prof. Đuro VIDMAROVIĆ

Marija BELOŠEVIĆ

Internacia ekspozicio

Kroata Esperantista Unuiĝo meze de oktobro ĉ.j. organizis kunlabore kun la Eŭropa domo Zagrebo kaj Kroata Konsilio de Eŭropa movado internacian ekspozicion de la lernejanaj desegnaĵoj.

Al la ĉeforganizanto venis preskaŭ cent diversestaj desegnaĵoj, el kiuj oni prezentis kvardek el Brazilo-Bona espero, Bulgario - Pazardik, Finnlando - Tampere, Hungario - Papa, Rumanio - Oradea kaj Kroatio-Zagreb.

La ekspozicion malfermis la prezidanto de Kroata Esperantista Unuiĝo, s-ro Radenko Milošević kaj la sekretario de la Eŭropa domo Zagrebo, f-ino Marija Pejčinović.

Post la malfermo, du lernantinoj - Esperantistinoj el la zagreba bazlernejo "Dragutin Domjanić" Martina Gazdek kaj Petra Kondres muzikis.

Laŭ la reagoj de ĉeestantoj, la programo estis tre bela. Same oni preparis la okazaĵon en radio (nacilingva programo).

Estas interese aldoni, ke dum la ekspozici-semajno oni kolektis librojn por la lerneja biblioteko en Nuštar, urbo apud Vinkovci, en kiun revenis kroata loĝantaro.

Komence de novembro ĉ.j. la ekspozicio estis prezentita en la biblioteko "Vladimir Nazor" en Zagrebo.

Komence de decembro la ekspozicion gastigos Gospić, same detruita urbo, kaj tiamaniere la ekspozicio komencos sian vojon tra Kroatio.

E-kursoj en bazlernejoj

E-kursoj, kies organizanto estas Kroata Esperantista Unuiĝo komencis en Zagrebaj bazlernejoj fine de oktobro. Oni organizas kursojn en kvar bazlernejoj. En du lernejoj, kie estas pli aĝaj lernantoj (14-15 j.), oni organizas eksperimente kursojn laŭ "Gerda malaperis...", aliaj lernas laŭ "Tendaraj tagoj".

La kursanoj preparas programon por la Zamenhofa festo kaj unu nacilingvan programon por prifeliĉigi la vivon de infanoj kiuj ne plu havas gepatrojn.

Kroata Esperantista Unuiĝo en Osijek

La 12-an de novembro 1992 Kroata Esperantista Unuiĝo kunlabore kun la Urba kaj universitata biblioteko en Osijek organizis prezenton de la ĵus eldonita libro "Poemaro de kroatoj en Hungario".



Mafermo de la ekspozicio,
prezidanto de KEU

La prezenton ĉeestis du poetoj kies poemoj estas tradukitaj kaj aperigitaj en la libro, Marko Dekić kaj Mijo Karagić. Flanke de KEU la libron prezentis la sekretario Marija Belošević.

Sesdedo da interesuloj tre atente aŭskultis la "naskiĝvojon" de la libro kaj interesaĵojn el la vivo de kroatoj en Hungario kaj pri la agado de Unuiĝo de Kroatoj en Hungario.

Estis legitaj kelkaj poemoj, en la kroata lingvo kaj Esperanto.

La lokaj radio kaj gazetaroj menciis ĉi okazaĵon.

La 13-an de novembro la sama libro estis prezentita en la Kroata klubo "August Šenoa" en Pecs, Hungario, kun partopreno de aliaj poetoj.

Estas menciinde, ke la prezenton partoprenis reprezentantoj de la loka Esperantistaro.

La poemkolekto estis ekspoziciita dum la granda ekspozicio de unujara eldonaĵo en Kroatio, same en Osijek.


Baldaŭ fondonta landa sekcio de IKUE

Kelkaj KEU-anoj el Zagrebo iniciatis fondiĝon de IKUE sekcio en Kroatio. Unua publika elpaŝo rilate tion estos la meso en Esperanto, okazonta okaze de la Zamenhofa festo en Zagrebo, la 12-an de decembro ĉ.j. Ĉiuj interesuloj povas jam nun skribi anonci sin al KEU.

Elpaŝi el Zagrebo

Kroata Esperantista Unuiĝo jam kelkajn monatojn intense kunlaboras kun diversaj organizoj kaj institucioj ekster Zagrebo, por pli konigi E-on ekster la "metropolo". La rezulto de tiu kunlaboro estos videbla jam dum decembro, kiam KEU organizos kelkajn prelegojn kaj ekspoziciojn en urboj dise de Kroatio.

Pri tio bonvolu pri detale legi en la venonta numero.



NI PREZENTAS AL VI NOVAN LIBRON EL LA KROATA LITERATURO

PJESNIŠTVO HRVATA U MAĐARSKOJ

POEMARO DE KROATOJ EN HUNGARIO

Eldonisto: Kroata Esperantista Unuiĝo, Zagreb, 1992, p. 136.

Kroata Esperantista Unuiĝo eldonis sian unuan libron. Temas pri la poemkolekto de kroatoj vivantaj en Hungario.

En la libro estas prezentitaj verkoj de 12 kroataj poetoj (Stipan Blažetin, Matilda, Bolcs, Marko Dekić, Branko Filaković, Đuro Franković, Ladislav Gujaš, Josip Gujaš-Đuretin, Mijo Karagić, Đuro Pavić, Đuro Šimara Pužarov, Lajoš Škrapić, Jolanka Tišler) du lingve - originale en la kroata kaj la esperanta traduko. Same la libro estas ilustrita pere de desegnaĵoj de Lujo Brigović, same kroato el Hungario.

La poemojn tradukis Lucija Borčić, Ivo Borovečki, Nataša Jakovljević, Emilija Lapenna kaj Franjo Šlabek.

La poemkolekton redaktis dr-o Mijo Karagić, prof. Đuro Vidmarović kaj Marija Belošević.

Ĉi foje ni prezentas la libron el la plumoj de la redaktoroj.

La poezia kreado de la kroatoj en Hungario havas unikan signifon por la spirita vivo de la kroata nacia malplimulto en ĉi tiu lando. Ĝi pruvas la vivecon de la kroata lingvo ekzistanta en fremda lingvomedio sen renovigado kaj memkonfirmado en normala komunikado.

Nacia poeto alilande vivas en certa lingva izolo rilate al la literaturaj eventoj okazantaj ĉe lia popolo. Pro tio lia rolo estas signifoplena, ĉar ĝi kontribuas al la konsekvado de lia gepatra lingvo kaj samtempe al la etna identeco de lia popolo.

La kroataj poetoj en Hungario tre aktivis prezentante en siaj verkoj la sorton de la malplimulto al kiu ili apartenas. Ili atingis estetikajn sukcesojn kiuj kapablas submetiĝi al la faka valorigo kadre de la tutkroata literaturo.

La traduko al Esperanto prezentas konatiĝon de la vasta kultura publiko kun tiu ĉi viva kroata poezia branĉo.

En ĉi tiu eldonaĵo estas prezentitaj la plej signifaj reprezentantoj de kroatoj en Hungario kaj la konigo pri ilia verkado donas al ĉi libro karakteron de antologio.

Đuro Vidmarović, prof.

ETAJ OAZOJ DE LA KROATA SKRIBITA TEKSTO

Plurjarcenta pasinteco de la kroatoj en Hungario estas evidenta pruvo pri la homa persisto, sindono kaj granda amo al ĉiuj ecoj de iu popolo, kaj tio estas la gepatra lingvo, kulturo, religio kaj malnovtempaj tradicioj. La plej grandan penon ĉe la konservado kaj pluportado de ĉi tiuj ecoj oferis la honestaj kaj konsciaj pastroj, instruistoj, kulturaj agantoj kaj verkistoj. Kiel talentitaj viziuloj, kiel homoj vidantaj la vorton de la malplimulto en fremda maro, ili kuraĝigis sian popolon, ke ĝi en la plej malfacilaj situacioj kaj kondiĉoj povu resti tio kio ĝi estas: memkonsciaj kaj fieraj kroatoj. Sen ilia malegoisma kaj oferema laboro, hodiaŭ sur la panonia ebenaĵo ne vivus ĉirkaŭ cent mil kroatoj, kiuj en la Respubliko Hungario vivas sufiĉe dise, kiel insuloj, sed kiujn insulojn firme kunligas la karavanaj vojoj de la kroata popola kulturo kaj la kroata lingvo, per kiu prikantatas amo, tritiko, vino, maro, suno, beloj kaj penoj de la ĉiutageco, sed neniam sangaj bataloj aŭ murdoj.

Al niaj verkistoj ni devas antaŭ ĉio danki, ke la kroatoj en Hungario posedas riĉan kulturon, ke per siaj verkoj ili pliriĉigis ne nur la hongaran, sed ankaŭ samtempe la kroatan kulturon ĝenerale.

La Kroata Unuiĝo en Hungario antaŭ du jaroj kontaktis la Zagreban Esperanto-Ligon, kaj dank' al ĉi modesta kolekto, kiu naskiĝis kiel frukto de tiu kunlaboro, parton el la verkoj de niaj kroataj verkistoj povas ekkoni ankaŭ la konantoj de Esperanto, la internacia lingvo aplikata dise en la mondo.

dr-o Mijo Karagić
landa sekretario
de la Kroata Unuiĝo en Hungario

Kroata popolo apartenas al la malgrandaj popoloj. Sed, la kroata popolo estas kulturriĉa, precipe dank' al la skribita vorto.

Prezentante ĉi tiun poemkolekton en la internacia, sed neŭtrala lingvo - Esperanto ĝi kontribuas al pli bona diskonigo de tiu riĉeco. La poemkolekto celas al la internacia legantaro, sed same al la kroata popolo en la patrolando mem kaj ekster ĝi por pli bona diskonigo de la poezio de kroatoj kiuj jam dum jarcentoj gardas sian kaj nian lingvon.

En la poemkolekto estas troveblaj la plej fama poetoj kiuj hodiaŭ ĉu pere de la skriba vorto aŭ laboro konsistigas la spiriton de la kroata popolo en Hungario.

Veninte ĝis la fino de ĉi-poemkolekto, sekvante la bildojn vi ne atingis la finon. Ĉi tio estas nur la fino de la komenco. Kroata Esperantista Unuiĝo per ĉi tiu poemkolekto fondas novan serion de la literatura verkado de kroatoj vivantaj ekster patrolando, kiuj estas konsistiga parto de la tuta kroata literaturo, ĝis nun ne tre konata en la patrolando kaj la mondo.

Marija Belošević

Pjesništvo
Hrvata u
Mađarskoj

Poemaro
de kroatoj
en Hungario



INSTRUISTA TREJNADO NIA PRIORITATO

En 1993 ILEI volas klare meti la emfazon sur instruistan trejnadon. Ni elkalkulis la proksimuman instruadan bezonon por pluivigi la parolkomunumon de miliono da homoj, praktike sen denaska fonto de novaj parolantoj. Ni taksis, ke necesus logi ĉ. 200.000 homojn al kursoj ĉiujare por rikolti 40.000 parolantojn kaj uzantojn. Tio postulas daŭran popolon da 10.000 instruistoj. Por teni tiun popolon stabila necesas trejni ĉ. 500 novajn ĉiujare, kio postulas krei kernon da instruisto-trejnistoj.

ILEI ne havas forton tuj atingi tiun nivelon, ĝi tamen starigis al si la defion proponi 50 lokojn en instruistaj kursoj en 1993 kaj 100 en 1994. Modestan ekpaŝon ni prenis per tri-taga intensa kurso pri komunika instruado en la Esperanto-Centro Poprad (Slovakio) frue en novembro. Ĝi logis nur ok partoprenantojn, tamen el kvar landoj kaj la plimulto estis praktikantaj instruistoj.

En 1993 ni proponos almenaŭ tri kursojn. D-ro Duncan Charters, brito vivanta en Usono, gvidos la plej ampleksan, antaŭvideble du-semajnan en Kultura Centro Esperantista (KCE) en Svislando komence de julio. Li profesie trejnas lingvo-instruistojn apud Ĥikago, cirkulas en avangarda eduka medio kaj aplikas la plej modernajn konceptojn kaj alirojn. La Poprada kurso bazita sur la lernolibro "Tendaraj tagoj" estos ripetita; gvidantoj por pliaj kursoj certe ne mankas (Barcsay, Dahlenburg, Kouzny, Smideliusz, Szanser, k.m.a.).

En la nova jaro ni kompilos registron de tiuj gvidantoj de instruistaj kursoj. Ĉiu skizos la specojn da kursoj proponebaj, kun diversaj daŭroj, cel-grupoj kaj instru-metodoj kaj la kondiĉoj bezonataj. Tiun katalogon ni proponos al la landaj asocioj kaj E-Centroj.

La malmultaj aliĝintoj al Poprad bezonas analizon. Ŝajnas, ke ILEI sukcesos oferti 50 kurs-lokojn en 1993, sed pli debateblas la kapablo trovi 50 taŭgajn kursanojn en la nunaj ekonomiaj kondiĉoj. Konkurenco de aliaj renkontiĝoj en la feria sezono ankaŭ malhelpas. Necesas fari kursojn ne nur por niaj nunaj instruistoj, sed ankaŭ por novaj, (de fremdaj lingvoj, de pacaj aŭ sociaj studoj) kiujn ni devos konvinki eklerni Esperanton.

Kelkaj bazaj paŝoj necesas:

- Havigi por niaj movade organizitaj kursoj minimuman agnoskon de edukaj instancoj, tiel ke instruistoj estu liberigitaj kun salajro por partopreni.

- Disponigi lokojn en tiuj kursoj preskaŭ senpage por instruistoj kun nesufiĉaj propraj rimedoj. Tiom urĝe ni bezonas kvalifikitajn instruistojn, ke la movado devus preti subteni kurs-partoprenon ne nur al tiuj, sed al ĉiu ajn instruisto, kiu havos la kondiĉojn poste adekvate instrui la lingvon.

- Organizati kursojn ne nur en E-Centroj, sed ankaŭ laŭ oficiala sankcio en centroj de naciaj aŭ aliaj edukaj instancoj, kadre de la normala programo de instruista trejnado aŭ plutreinado.

- Sisteme starigi reton da homoj, kapablaj trejni la instruisto-trejnistojn. Tiun temon ni atakos kune kun d-ro Charters okaze de lia vizito al Eŭropo somere.

Tiuj argumentoj bezonas detaligon kaj transformon al kohera laborplano. Ili tion ricevos en numero 92/4 de "Internacia Pedagogia Revuo", kie aperos la plena versio de ĉi tiu novjara saluto.

Ne eblus adiaŭi 1992-an sen mencii la sukcesan lanĉon de la Gimnazio de ILEI dum nia Konferenco en Bratislavo. Ĝi celas kontraŭi la perdadon de lernejoj kursfine.

Okaze de la jarŝanĝo indas elstarigi la kreskon de "Juna amiko", kiun ILEI nun prizorgas. Por festi ĝian dudek-jariĝon, anstataŭ 24 paĝoj, ĉiu numero havos 32 kaj povos pli taŭge enteni ion allogan por ĉiu aĝ-grupo inter 5 kaj 15.

Ni rekomendas membrecon en ILEI al ĉiu, kiu instruas, okupiĝas pri edukado aŭ rekonas ĝian gravecon al nia movado kaj komunumo. Nia organo "Internacia Pedagogia Revuo" portas valorajn fakajn artikolojn, strategiajn debatojn, kaj praktikajn informojn.

Ni estas konvinkitaj, ke kohera programo de instruista trejnado estas ŝlosilo al kresko kaj progreso. Per membriĝo kaj kunlaboro en nia agado, vi povas esprimi konkrete vian konsenton pri tio.

Ĉion bonan por la nova jaro deziras,

Stefan MacGill, Prezidanto de
ILEI



Estraro de ILEI en Bratislava

EDUKA REZOLUCIO AKCEPTITA DE LA KOMITATO DE UEA EN LA 77a UK EN VIENO

La Komitato

- agnoskas la gravecon de la nove lanĉita Gimnazio de ILEI, por evoluigi la instruadon de aliaj stud-temoj pere de Esperanto;
- instigas ILEI daŭrigi sian eldonadon de bazaj lerniloj por diversaj cel- kaj aĝ-grupoj, kies ĵus aperinta elemento estas la dua kajero de "Tendaraj tagoj";
- gratulas pro la daŭra eldonado dum 22 jaroj de la valora revuo IPR;
- salutas la transprenon de "Juna amiko" flanke de ILEI, por ke tiu internacia lernejana revuo ne pereu, sed eniru sian deknaŭan jaron de regula aperado;
- notas, ke restas senĉefa la alvoko al Landaj Asocioj en la pasintaja eduka rezolucio proponi solvojn por la transpagaj baroj minacantaj la revuon-nome, ĉiuj solvoj ĝis nun kreitaj fontis el la redakcio. ĉar tiuj solvoj restarigis apenaŭ kvaronon de la perditaj abonoj,
- ripetas la alvokon al la Asocioj por la estonta jaro;
- rekonas la rekordan rezulton de la UEA/ILEI ekzamenojn en 1991, kun 102 sukcesintoj el 18 landoj kaj dek sesioj; kaj
- intencas trakti la proponatan regularon por la supera nivelo dum la vienaj kunsidoj, por ebligi ĝian starigon;
- vokas al la Landaj Asocioj instigi siajn membrojn partopreni en enketo lanĉota de ILEI por determini la motivojn kaj manierojn de lernado de Esperanto, kies rezultoj ludos centran rolon en sub-temo de la UK en Valencio en 1993: "Kiuj lernas Esperanton en la mondo - kial kaj kiel?"
- konsentas kun ILEI pri la kerna rolo kaj nesufiĉeco de instruista trejnado. Laŭ la sekva klopodo proksimume taksu la skalon de bezono -

Por atingi aŭ teni parolkomunumon de ĉ. 1.000.000 homojn
Necesas ĉiujare logi al komencantaj kursoj ĉ. 200.000 homojn
Por el ili rikolti parolantojn kaj uzantojn ĉ. 40.000 homojn
Tio postulus konstantan popolon da instruistoj ĉ. 10.000
Por teni tion stabila necesas trejni ĉiujare ĉ. 500
Kaj trejni aŭ trovi instruisto-trejnistojn jare ĉ. 20
La Komitato:

- urĝas ILEI prepari serion da por-instruistaj kursoj divers-nivelaj kaj divers-lokaj, kun la celo trejni en 1993 minimume kvindekond da instruistoj kaj en 1994 minimume centon.
- invitas ĝin submeti al UEA buĝeton por la plenumo de tiu celo, indikanta la gradon de investo farebla de ILEI kaj partojn de la plano, kiuj ne povos esti mem-financaj, kaj laste
- instigas ILEI prepari strategion por la trejnado de instruisto-trejnisto.

EL LA VIVO DE ESPERANTISTOJ

Ni deziras prezenti al la legantaro ĉiufoje alian urbon kie agas Esperantistoj en Kroatio.

Por la komenco ni prenis Osijek, urbo en Slavonio, sufiĉe detruita dum la milito. Sed, la vivo revenis en la urbo, same la Esperantistoj komencis agi.

La Esperanto-societo "Liberiga stelo" okazigis kelkajn kunvenojn, bedaŭrinde ne en siaj ejoj, sed privata domo. En la studenta centro kie antaŭe renkontiĝis Esperantistoj, nun provizore estas vere studenta loko. Tie oni translokiĝis du fakultatojn kies ejoj estas neriparitaj.

La Esperanto-societo posedis tre riĉan bibliotekon. Feliĉe oni solvis problemon pri la libroj sufiĉe kontente: ili estis donitaj al la Urba kaj universitata biblioteko en Osijek kun unu ŝranko. Oni povas pruntepreni librojn montrante societan membro-karton, kaj la libroj estos same pruntepreneblaj al aliaj interesuloj. En la legejo oni povas foliumi "El popola ĉinio" kaj aliajn tre valorajn librojn.

Oni planas vigligi la E-vivon, organizi kursojn, prelegojn, kunlaboron kun Esperantistoj el la amika urbo Pecs, k.a.

Kvankam la milito daŭris sufiĉe longe en tiu urbo, unuopaj Esperantistoj ne nuligis siajn internaciajn kontaktojn. Ili skribis al siaj eksterlandaj amikoj pri la teruraĵo, pro kiu multaj devis forlasi siajn domojn, sed multaj revenis.

Unu inter ili, Aleksandar Kocian eĉ sukcesis partopreni trian korespondan internacian esperantistan GO turniron.

Li korespondas kun 7 kunludantoj: du japanoj, du ĉinoj, unu usonano, germano kaj ruso.

S-ro Kocian sendis al ni regularon kiun ni aperigos en la venonta numero.


Ĉiuj kiuj deziras subteni ilian laboron povas skribi al la provizora adreso:

Aleksandar Kocian
por Esperanto-societo "Liberiga stelo"
Radićeva 11,
54000 Osijek,
Kroatio.

Saša Kocian

Bildstrio: OMBRO

Aŭtoro:
NINOSLAV KUNC



750 JAROJ DE LA ORA BULEO DE LA HUNGAR-KROATA REĜO BELA IV

Zagrebo, metropolo de ĉiuj kroatoj kaj la ĉefurbo de la respubliko Kroatio festis la 16-an de novembro ĉ.j. 750-datrevenon de la Ora Buleo. (Buleo estas ĝenerale publika dokumento eldonita de Papo, aŭ inperietro aŭ reĝo).

En la jaro 1242-a, la 16-n de novembro, la hungar-kroata reĝo Bela la 4-a publikigis en la kroata urbo Virovitica Oran Buleon al la metiista kvartalo en Zagrebo Gradec (Urbeto).

En tiu tempo Zagrebo estis sidejo de la episkopejo. La kvartalo, sidejo de la episkopejo nomiĝas Kaptol (Kanonikaro). La Episkopejo estis fondita en la jaro 1094. La historio de kolonio sur la loko de la hodiaŭa Zagrebo datas de la bronzepoko.

La privilegioj kiujn ricevis Gradec de la reĝo Bela la 4-a ebligis ĝian rapidan politikan kaj ekonomian evoluon.


Oni povis mem elekti la urban juĝiston, kiun devis konfirmi la reĝo, laŭ la buleo Gradec devis gastigi reĝon kaj liajn akompanantojn.

Same oni promesis plifortigi sian kvartalon, kaj la reĝo donis al ili teron ĉirkaŭ tiu monteto.

La Kroata Parlamento (Hrvatski Sabor) la urbon Zagrebon unuan fojon en marto de la jaro 1557, en la dokumento-komuniko al la kroata reĝo Ferdinando de la aŭstria dinastio

Habzburg nomis "metropolo de ĉi tiuj landoj".

Ivan Bekavac-Basić



Buleo

FESTO DE BOLONJANOJ

La kontaktoj inter la Esperantistaro de Bologna (Italio) kaj Zagrebo daŭras jam pli ol unu jardekon. Oni interŝanĝas leterojn, gazetojn, eĉ dubusa zabgreba grupo vizitis antaŭ tri jarojn bolonjanojn.

Eble la sekreto de tiu bona kunlaboro kuŝas en longa E-tradicio en du urboj. Antaŭ tri jaroj la

zagrebanoj festis 80-jaran jubileon, kaj ĉi jare la bolonjanoj.

La festo okazis fine de septembro, 25-27-a. Venis multaj Esperantistoj el aliaj italaj urboj, (ĉar same historie, Bologna ludis kaj ankoraŭ ludas grandan rolon en la Itala E-vivo kaj kelkaj eksterlandaj.



Zagrebanoj en la vizito

Ĉiujn tri tagojn ne nur Esperantistoj, sed same bolonjanoj havis eblecon dank' al fotoj ekkoni la historion de E-vivo en Bologna. La magistrato tre subtenis ĉi feston donante ejojn por okazigi kelkajn programerojn (publika debato pri Esperanto en la dumila jaro kaj internacia kultura agado de Esperantistoj). Aparte estis impona koncerto de koruso "Stelutis", kiu estis donaco de Esperantistoj al bolonjanoj (eniro senpaga).

M.Belošević

EVENTOJ

Estimata,

Kiom valorus al Vi esti informita pri la eventoj de la internacia esperanto-movado, kaj ricevi internacian esperanto-gazeton en ĉiu dua semajno?

Vi estas aktiva esperantisto, do apartenas al tiuj, kiuj pretas kaj volas fari ion por la progresigo de nia movado. La dusemajnan gazeton EVENTOJ ni starigis en marto en tiu ĉi jaro, kaj per la ĝisnuna regula aperado ni pruvis la ĝustecon de tiu ideo. Nun ĝi estas abonata en pli ol kvardek landoj, kaj legas ĝin granda parto de UEA-delegitoj, komitatanoj kaj multaj movadaj gvidantoj, aktivuloj.

La gazeto estas eldonata de LINGVO-Studio, do ni ne estas ligitaj al iu landa asocio. Ĝuste pro tiu "sendependeco" ni ne devas respekti diversajn artikolojn pri diversaj organizoj, aranĝoj, fenomenoj de nia movado, ili estas por montri la mankojn, kaj helpi por plibonigi ilin!

La gazeto EVENTOJ aperas dusemajne!

La karaktero de EVENTOJ estas du-tipa: unuflanke ni aperigas aktualajn informojn, aliflanke ni represas elektitajn interesajn artikolojn el aliaj E-gazetoj (ĝis nun el 63 revuoj, gazetoj, informiloj).

Ni proponas al Vi, ke Vi faru prov-abonon al EVENTOJ por unu jaro! Por tio Vi simple resendu la abonilan slipon, kaj pagu la abonkotizon de 23 NGL (validas nur por Kroatio) al la UEA kodo: ELLS-S aŭ la egalvaloron al nia kotizperanto:

Kroata Esperantista Unuiĝo
Marija Belošević
Trg burze 2, HR-41000 Zagreb.

Ni scias, ke tiu prezo estas sufiĉe alta je la unua vido, sed bonvolu mem kalkuli da perpoŝtan sendokoston por dusemajna sendaĵo...

Ĉu aboni al EVENTOJ? Kial ne?! Se Vi abonas ĝin NUN por 1993, Vi ricevos sen aparta pago ankaŭ la ĝisjarfinajn nomerojn en 1992!

La paĝoj de EVENTOJ staras je Via dispoŝo! Ni volonte konsiderus vin kiel konstanta kunlaboranto! Sendu informojn pri vialandaj E-eventoj, kaj sendu vian opinion, rimarkojn pri la aperintaj artikoloj. La evoluo de nia movado dependas ankaŭ de Vi!

Por ne forgesi pri la abono, resendu la abonilon ankoraŭ hodiaŭ!

Kun samideanaj salutoj

Szilvasi Laszlo

Amuzaĵoj

Rezultoj el la 1-a kaj 2-a numero de "Kroata Esperantisto" en la unua numero oni donis kelkajn demandojn ligitaj al la reapero de la gazeto. Jen la respondoj:

La unua numero aperis en la jaro: b) 1909

La unua redaktoro de la gazeto estis: c) Danica Bedeković

La gazeto aperis en: a) Zagreb

La nuna eldonanto de la gazeto estas: c) Kroata Esperantista Unuiĝo

Unujaran senpagan abonon por "Kroata Esperantisto" ricevis Vera Ĉornij el Skopje, Makedonio.

La dua numero donis foton kaj demandon:

komuna okupo de Stefan Maul, Istvan Ertl kaj Jacques Le Puil.

Bona respondo estas: c) ĵurnalismo

Rimarko:

Stefan Maul estas prezidanto de la Tutmonda Esperanto ĵurnalisma Asocio, fondinto kaj plurjara redaktoro de "Monato".


Istvan Ertl nun redaktas "Esperanto"-n, oficialan organon de UEA.

Jak Le Puil redaktas "La Kancerkliniko"-n, "Cher-Esperanto"-n (Cher nomo de lia departemento) kaj "Le Pivert" (La Pego) organo de la verduloj de la departemento (kun vortludo "PIVERT"="VERT"=verda).

Unujaran senpagan abonon por "Kroata Esperantisto" ricevis Gordana Plavšić el Pula, Kroatio.

Bildstrio: OMBRO

Aŭtoro:
NINOSLAV KUNC



NI VIZITIS ESPERANTO-BIBLIOTEKON


Dum nia maja restado en Budapeŝto, ni vizitis multajn interesajn. Pri tio ni jam skribis.

Sed ĉi foje mi deziras iomete aparte priskribi nian viziton al unu malnova domo, maljuna sed tre simpatia homo kaj Esperanto-muzeo. Do, tia maniere, ni kontribuas al la Tago de Esperanto-libro.

Multaj esperantistoj, jam scias, ke temas pri la vizito al s-ro Fajsi. Li posedas grandegan Esperanto-bibliotekon. En tiu biblioteko ne estas nur libroj, sed same gazetoj, fotoj, insignoj, kaj eĉ unu Esperanta ĉokolado, bedaŭrinde ne manĝebla.

Aparte por ni estis interese vidi plurajn porinfanajn librojn el la tuta mondo en Esperanto. Denove bedaŭrinde, ilin ni ne povis kunporti hejmen, kaj pli serioze foliumi.

El la gimnaziaj tagoj



S-ro Fajsi parolis al ni kia maniere li atingis tiom da libroj. Mallonge dirite, nefacile, eĉ malfacile! (Mi mem ne provos!)

Estis interese vidi plurajn librojn eldonitajn en Kroatio.



Ĉe s-ro Fajsi

Por la memoro, ni faris komunan foton kun s-ro Fajsi kaj donacis al li kelkajn numerojn de "ZELano" kie oni povas legi kelkajn niajn kontribuajn.

Marko Kordiŝ

JUNULARA MONDO

Karaj samaĝuloj,

ha, kiel Vi povas legi en ĉi-numero, al ni mezlernejanoj kaj iom pli aĝuloj, sed tamen junularo, oni forŝtelis "Gerda...", sed feliĉe ke ĝi ne denove malaperis!

Ni havas nenion kontraŭ tio, kaj ni nur promesas, baldaŭ organizi kvizon, kaj ni vidos kiu kiom scias. La ideo naskiĝis ke estus bone traduki la vortliston al iu "najbara" lingvo por okazigi internaciajn kursojn. La afero jam estas en studado, kaj baldaŭ en preparado.

Niaj anoj estas tre aktivaj kulture, kaj plej verŝajne okaze de la Zamenhoftago, aperos unu nova Zamenhof. Ne timu, ne temas pri iu persono, sed unu nia prilaboro. ĝi estos eĉ aĉetebla.

Ĉar restis ankoraŭ kelkaj kaŝitaj fotoj el Bratislava, pri la Gimnazio, ni tre bonvole disponigas nian spacon por ili.

KZ&Darko Jukica

PAĜO DE LA LEGANTARO

Estimataj,

en la lasta numero ni promesis al Vi Vian rubrikon. Jen ĝi!

Ni prezentas la ricevitajn reagojn pri la (re)apero de nia gazeto. Ni invitas same Vin reagu, kritiku, laŭdu!

Dankon pro "Kroata Esperantisto". Ege plaĉas al mi via konkurso. Mi eĉ tute ne memoris pri tiu foto kun du ne malgajaj amikoj miaj! Ĉion bonan al vi ĉiuj

Jak Le Puil

Antaŭ kelkaj tagoj atingis min nova E-revuo, aŭ pli ĝuste renaskiĝinta revuo-"Kroata Esperantisto", kies mankon fakte oni ĉiam sentis konsidere al tio, kio en la sfero de E-o ĉiam okazis en Kroatio. Ke malgraŭ la militaj malfacilaĵoj oni sukcesis eldoni ĉi tiun revuon, kiu laŭplane de nun aperos ĉiun duan monaton, estas admirinda kaj gratulinda. La redaktorino de la revuo Marija Belošević informas la legantaron, le "Kroata Esperantisto" unuafoje aperis en 1909 kaj tiam al la redakcio gratulleteron sendis Zamenhof mem. Poste la revuo devis fronti malfacilaĵojn kaj finfine malaperis. La renaskiĝinta "Kroata Esperantisto"-kiel substrekas Marija Belošević- ne nur estas organo de Kroata Esperantista Unuiĝo, sed "enhavde ĝi estas malfermita al la mondo". Kaj sekvas invito al la kunlaboro. Bone! Oni memoru tion!

Kion ni trovas en la unua numero? Unuavice ŝpiniĝas temoj ligitaj kun la milito, jen pri mortigitaj infanoj, jen pri detruitaj fervojoj, pri la Ruĝa Kruco, kies agado estas nuntempe aparte grava. Ne mankas E-temoj, ekz. pri plibonigo de la E-instruado-artikolo de Mila van der Horst-Kolinska. Krome-junulara rubriko, bazaj informoj pri Kroatio ktp. Rimarkinda estas la klarigo pri la kialoj de la fondiĝo de Kroata Esperantista Unuiĝo, optimismiga en ĉi tiu deklaro estas la konstato, ke "por ĉiu ekzistas loko en esperantisma kaj homaranisma ĝardeno".

Sed apud multaj por estonteco optimismigaj temoj mi trovis almenaŭ unu, kiu denove ĉangrenis min ege. "Radio-Zagreb, Esperanto-Fako, ekmotis". Ĉi-teman artikolon de Emilija Lapenna akompanas du fotoj, kiuj iom ilustras aŭ memorigas la 39-jaran agadon de grupeto da oferemaj kunlaborantoj, kiuj ĉiam-eĉ en plej malfacilaj politikaj tempoj - semis tra la mondo maksimuman veron pri Kroatio. La sukceson de ĉi tiuj elsendoj stampis profesieco, sincereco kaj patriotismo, kiujn la konstantaj aŭskultantoj ĉiam facile povis rimarki. Afero stranga kaj nekomprenebla. Nun kiam oni parolas tiom vaste pri la unuiĝanta Eŭropo, kiam ĉi tiun unuiĝadon povas helpi pli ĉiufanka informado, oni decidis likvidi la elsendojn, kiuj povus tiom bone kontrubui al la diskonigado de veraj informoj. Estas malfacile kredi, ke la decidon oni faris definitive. Mi mem

prefere emus kredi, ke temas pri provizora likvido. Ke post kelka interrompo la disaŭdigoj revenos. En Vieno dum la 77-a UK multe da atento oni dediĉis al la graveco de radio-informado el Zagreb pere de E-o pri tio, kio okazas en Kroatio, kio okazas sur la tuta tereno de la iama Jugoslavio. Mi ne dubas, ke ĉi tiuj opinioj kaj ankaŭ aliaj, kiuj venis kaj eble venos al Kroata Esperantista Unuiĝo estos atente prianalizitaj kaj ke sekve iun belan tagon ni povos aŭdigi ĝojigan novaĵon - radio Zagreb denove ekparolis en E-o!.

- teksto prezentita en la E-elsendo de la Pola Radio.

Andrej Pettyn

Nia leganto el Makarska, ankaŭ sendis al ni la apelon direktitan antaŭ unu jaro, precipe la 6-an de novembro 1991 al la CO de UEA. Neaperigita ĝis nun! Tial ni korektas la eraron kaj diskonigas ĝian enhavon.

APELO POR PACO EN KROATIO

Kiel esperantisto dum 40-jardaŭro, laŭ tio kiel humanisto kaj pacamanto, mi ne povas rezisti al postulo de mia menso, min turni al la plej alta instanco de samideanoj per unika peto:

FARU ION ĈE LA EŬROPA KOMUNUMO KE ĜESU TIU ĈI FRENEZA MILITO EN MIA PATROLANDO KROATIO!

Dum monato, serbo-armea agresanto detruas niajn urbojn kaj vilaĝojn, ekstermas niajn bienojn kaj sanktaĵojn kie pereas miloj da homoj grandparte civiluloj.

Mi demandas min, kiel kultura kaj pacama Eŭropo povas tiel longe observadi tiun tragikon de la kroata popolo, tiujn terurajn suferojn de la urboj Vukovar, Dubrovnik, k.a., tiun infernan penetron de malbono kiu minacas ankaŭ al Eŭropo?

Mi petas vin: levu vian voĉon kaj postulu la pacon al Kroatio, la kondamnon al agresanto, la sendependecon kaj suverenecon al nia kara patrolando Kroatio!

Mi kredas al via konsento kun mia peto, kaj ke vi faros konvenajn paŝojn por la paco.

Mi kore dankas kaj restas via sindona samideano

Ivo Puharić IM de UEA

Mallonga anonco pri la aperigo de nia gazeto estas trovebla en Internacia ĵurnalisto, n-ro 4/92.

Oni koncize prezentas la enhavon de la unua numero de la "nova gazeto kun malnova nomo". En la lasta linio "Ij" deziras al la nova revuo bonan sukceson!"

Dankon! KE

Amuzaĵo

Elprenu el ĉiu vorto unu literon, ke la restintaj neŝanĝinte lokon donos novan vorton.

La respondojn sendu al Kroata Esperantista Unuiĝo, Trg burze 2, Zagreb ĝis la 10-a de januaro 1993.

KANTO	KAROBO	MANKO	LUNDO	OFERO
PASTRO	PONTO	STATUO	TABELO	VINTRO

Pac', pac', pac',
feliĉ', feliĉ', feliĉ',
al la tuta mond'

Kroata Esperantista Junularo

Feliĉan Kristnaskon kaj prosperan Novan 1993 jaron al niaj samfakuloj, Esperantistoj kaj ĉiuj homoj de la bona vol'

deziras

Kroata Fervojista Esperanto-Societo

Atingon de ĉiuj niaj komunaj deziroj por plivastigi nian lingvon, kaj komprenon de gelernantoj kaj gekursanoj okaze de la Kristnasko kaj Novjaro deziras al vi

ILEI-LS en Kroatio

Pacon kaj bonon al la kroata kaj ĉiuj aliaj popoloj

deziras

Kroata Esperantista Unuiĝo